## ASPEKTOJ DE VERDISMO

Verdismo havas multajn aspektojn, kaj vera Verdulo pensas pri ĉiuj. Tamen neniu havas tempon labori forte en ĉiuj kampoj, do elektas tiujn kiuj plej interesas lin/ŝin. Unu uzo de AVENO estos meti en kontakton verdulojn el diversaj nacioj por kiuj unu aspekto estas aparte grava, ekzemple la tiel nomata Tria Mondo, Feminismo, Kontraŭmalpurigado, la Pacmovado, ktp. AVE-anoj estas do invititaj mencii siajn "specialaĵojn" kiam ili skribas al ni. Jen jam du homoj serĉantaj kontaktojn:

Viĉjo Simcock (Clayton House, Butterton, Leek,Staffs, Britio) aparte interesiĝas pri Ĝorĝismo, t.e. la principo de Henry George (1839-1897) ke ni ne forigos malriĉecon ĝis ni klare distingos inter ter-posedaĵo kaj posedaĵo de objektoj faritaj de homo, principo jam akceptita de la brita Ecology Party.

Christopher Fettes (via redaktoro!) interesiĝas pri Popolkapitalismo (ankaŭ nomita ĉefe socikredito), t.e. la principo ke ĉar nunaj riĉaĵoj rezultas ne de nuna laboro sed de ĉies teknologia heredaĵo, la longe akceptita "labor-etiko" ne plu validas.

## ESPERANTAJ ELDONAĴOJ PRI EKOLOGIO

En la venonta numero de AVENO, se oni informos nin, ni listigos librojn kaj libretojn kiuj aparte interesus Verdulojn. Ni ĉi tie menciu du, havebla ĉe Cercle amical esp. de l'Agenais, F-47340 Laroque Timbaut (pĉk 3371 74 M Bordeaux): "Katastrofplano pri la atomcentralo de Fessenheim" (1980, 38 paĝoj, 5FF) kaj "Por ekologia socio" far Murray Bookchin (1983, 120 paĝoj, 12FF); ambau kune 20FF inkl. de la afranko.

## PRI VENONTAJ NUMEROJ DE AVENO

Telegramstile: Raportoj pri Kongreso de Eŭropaj Verduloj, daŭrigo de artikoloj pri naciaj verdmovadoj, intervjuoj kun konataj Verduloj, "Ĉarto de Paco" far la Orient-okcidentaj Pacanoj, viaj leteroj, recenzoj, ktp. (Limdato: 1985-03-31).

---

Kara leganto! En ĉi-kuna rektangulo vi trovos au "Dankon" au "Peton". "Dankon" signifas ke vi jam abonis; kaj "Peton" . . . ! Oni sendu $3, £3, 30FF, 200BF aŭ 10 DM al Sekr. aŭ Redakt., aŭ 12 gld al nederlanda poŝtĝirkonto "5479470 C.F. KRISPERANTO".



# AVENO n° 1

kvaronjara bulteno de la
Asocio de Verduloj Esperantistaj

Sekretario: Jean-Claude Thumerelle
Place de la Station 16, 7790 Warneton, Belgio

Redaktoro de "Aveno": Christopher Fettes
St Columba's College, Dublin 16, Irlando Resp.

Januaro-Februaro-Marto 1985

## Enkondukaj Vortoj

Tiuj Verduloj kiuj jam ricevis la "nulan" numeron de Aveno estas devigitaj longe atendi tiun ĉi vere unuan. Pro tio mi komencu per pardonpeto; mi tamen emfazu ke tiu prokrasto havis gravan kaŭzon: mi volis informi vin pri la venonta Kongreso de Eŭropaj Verduloj, kaj nur hodiaŭ mi ricevis plenajn detalojn. Kutime Aveno aperos meze de la unua monato de la jarkvarono; tio signifas ke tiuj el vi kiuj ne povos ĉeesti la menciitan (kaj menciotan!) kongreson almenaŭ legos sufiĉe freŝajn novaĵojn pri ĝi.

En la angulo vi vidos nian simbolon: ĝi estas havebla samgrande kiel butono (sed kun iom pli oranĝkoloraj florpetaloj) kaj estos praktika ilo kaj por rekoni unu la alian kaj por instigi demandojn pri Esperanto dum la Kongreso.



Pri AVE ni jam ricevis petinformojn el multaj landoj, ekzemple de Japanio al Ĉilio, de Norvegio al Zairo. Kun la venonta numero de Aveno ni elsendos etan adresaron: bonvolu informi nin se vi preferus ke via adreso ne aperu en ĝi. Intertempe mi esperas ke la ĉi-tiea enhavo plaĉos al vi ! C.F.

## PROPONOJ POR IA AGADO

Kiamaniere la esperantistaj verduloj povas agadi por Esperanto inter la verdaj naciaj movadoj ?

Tio estas fundamenta demando; kaj por trovi sufiĉe kontentigan respondon, ni unue klasifiku la esperantistajn intervenojn en ekologiaj medioj laŭ du ĝeneralaj tipoj:

a) La aprioraj intervenoj, t.e. prelegoj pri Esperanto dum verdaj kunvenoj, prezento de la lingvo per artikolo en naciaj gazetoj, disdonoj de varbfolioj (AVENO jam proponis tekston kiu povas esti utila al vi en sia numero 0!).

b) La aposterioraj intervenoj. Tiu dua agadtipo necesigas, ke unue esperantistaj verduloj konkrete kaj individue partoprenu en agado iniciatita de ekologia movado; kaj nur poste komenciĝos la agado por Esperanto. Ĝi konsistos en kontaktoj kun la movado (kiun la esperantistoj subtenis) kaj klarigoj pri la individuaj subtenoj ebligitaj de Esperanto. Kompreneble tia agado estos efika se ekzistas reala kunordigo inter la individuaj partoprenantoj kaj la aposteriora intervenanto. Mi pensas ke AVENO povas esti tre bona ilo por tiun kunordigon.

J-C.T.

(Vidu ankaŭ "Ekzemplo pri praktika agado" sur paĝo 6.)

* * * * * *

## NEŬTRALECO EN ESPERANTISMO KAJ EKOLOGIO

D-ro Wolfgang Gunther (Schulstr.7, D-3501 Ahnatal-Weimar) verkis tre interesan dokumenton, "La ekologia difino de la neŭtraleco en Esperantismo", per kiu li esperas konvinki UEAn ke la difino pri neŭtraleco en ties statuto devos esti reverkita de ekologia vidpunkto. Konferenco pri tio li intencas aranĝi dum la venonta Universala Kongreso en Aŭgsburgo. Lastatempe li skribis:

"Ekologio en la plej fundamenta universala senco ne estas politiko partia aŭ ideologia. Ĝi neniam kaj neniel kontraŭas la ideon de neŭtraleco; male: senekologia baziĝo de internacia neŭtraleco estas kontraŭdiraĵo en si mem - ĉar neŭtraleco preterrigardanta la objektivigeblajn ekologiajn interesojn ĉiam kaj antaŭvideble kondukas al plua detruo en iu aŭ alia parto de nia planedo: neŭtraleco sen ekologio aŭ ne ekzistas aŭ estas mensogo!"



## DUA KONGRESO DE EUROPAJ VERDULOJ

### 22-24 Marto en Dover, Anglio

En la tuja estonteco nenio estas pli grava por ni ol la supre menciita kongreso; ĉar dum la tutmonda esperantistaro, konvinkita pri la nuna ekologiaj problemoj, ne sufiĉus por savi la planedon, la multmilionaj Verduloj en diversaj landoj ja povus fari tion se ili scius komuniki kaj kunagadi per Esperanto.

Nia unua devo do ne estas konvinki Esperantistojn pri la graveco de la nuna situacio ekologia (kvankam ni certe klopodos fari tion kiam eblos) sed montri al aliaj Verduloj ke nia kara Internacia Lingvo estas perfekta ilo por krei movadon kiu - el letero de sveda AVE-ano Martin Strid - estas "vere popola kaj ne ligita al ŝtataj, burokrataj, industriegaj au bankistaj interesoj".

Pro tio mi urĝas vin kiel eble plej multnombre veni al Dovero; kaj antau ĉio nepre ne forestu pro manko de mono: se por vi la kongreskotizo, £9, estas ~~por vi~~ tro alta, mi mem pagos por vi! Kondiĉe ke vi informu min ne pli malfrue ol la 6an de Marto, surplanka dormado estos ebla kontrau nur £1 por ĉiu nokto: sensalajraj Esperantistoj junaj do povos ĉeesti la tutan kongreson por nur £2 plus vojaĝ- kaj manĝ-kostoj! Kompreneble serioza intereso pri ekologiaj problemoj necesas, sed membreco de verda partio ne estas deviga.

Sed kio okazos, vi certe demandas, dum tiu kongreso (krom varbado por Esperanto!) ? Nu vendredon je 15.00 okazos la unua plena kunsido, pri "Europo de Regionoj", dum kiu la gastparolanto estos Leopold Kohr, kies "Breakdown of Nations" unue prezentis la tezon ke trograndeco troviĝas ĉe la radikoj de ĉiu socia mizero. Sekvos (traplektitaj per multaj grupdiskutoj, ktp) kunsidoj pri "Agrikulturo", "Ekonomiko" kaj "Verda Politiko: kiel ĝi povas funkcii"; el inter la konataj parolantoj estos Rudolf Bahro, Fritjof Capra kaj Jonathon Porritt, ĉiuj tri verkistoj de nemalhaveblaj libroj pri Verdismo.

Kaj pri lingvoj ? Nu, oni promesas samtempan tradukadon en la anglan, francan, germanan kaj nederlandan lingvojn; se vi venos sufiĉe amase, eble venontfoje ankau en Esperanto!

Do vi nun turnu vin tuj al via agendo, tiam al la ĉi-kuna aliĝilo, trie al viaj amikoj esperantistaj !

C.F.

## POLITIKAJ MOVADOJ EKOLOGIAJ EN DIVERSAJ LANDOJ

Ĉar unu el la taskoj de nia asocio estas pli bone konigi, al ĉiuj esperantistaj verduloj, la internacian politikan movadon ekologian, ni komencas en tiu ĉi bulteno publikigon de serio da artikoloj, kiu kompreneble necesigos la kunlaboron de niaj legantoj . . . .

### I) BELGIO

La 8an de novembro 1981 okazis en Belgio evento tute nova en la historio de la politika vivo: unuafoje en Europo, kaj eĉ en la mondo, ekologiistoj eniras en nacian parlamenton. Kun reprezentado en la Parlamento, kiu de tiu dato konsistas el 4 deputiloj (2 Valonoj + 2 Flandroj) kaj 5 senatoj (4 Valonoj + 1 Flandro) la belgaj ekologiistoj montris, ke ili estas vere politika forto

Pri la kialoj de tiuj ekologiaj sukcesoj, la politikistoj, sociologoj kaj amaskomunikiloj multe skribis kaj starigis multajn demandojn. Sed ĝenerale ili ne komprenis (aŭ ne diris!) ke la precipa kialo de tiu sukceso estas la ĝusteco de la ekologiaj tezoj. Iom post iom pli multaj estas la homoj kiuj konsentas kun tiuj analizoj kaj kontraŭ tio la amaskomunikila bojkoto ne plu efikas !

Kiamaniere ekologio eliris el la universitatoj kaj el la laboratorioj ? Unue, la teoria koncepto pri ekologio evoluis. Se ekologio havas kiel studobjekton la rilatoj de la vivantaj estaĵoj inter si kaj kun la medio, ĝi sekve interesiĝas pri la ekvilibro kaj malekvilibro kiuj povas okazi en la natura medio. Do, ekologio ne povas ignori unu el la estaĵoj kies agadoj estas tre gravaj por la naturo: tio estas la homo.

De tiu momento rapide aperis la neceso taksi la rezultojn de la homaj agadoj rilate la naturan medion sed ankau ~~la~~ rilate la homan medion, tio estas la sociaj organizo-formoj kiuj karakterizas la homon en la naturo. Sekve ekologio riĉiĝis per analizoj kiuj ne plu estis en la nura sfero de la naturaj sciencoj. Ĝi proprigis al si sociologiajn kaj ekonomiajn vidpunktojn. Ĝi lasis la nuran priskriban diskurson por estiĝi politika penso, ideologio kaj politika praktiko . . . .

En 1976 unuafoje oni povas legi en Belgio la vorton "ekologio" sur pribalota listo. Tio okazas en Namur dum komunumaj balotoj. En alia urbo Mons estas ankaŭ listo kiu defendas ekologiajn vidpunktojn.



Neinversigebla procezo komenciĝis ! En 1977 la belgaj ekologiistoj partoprenas la kampanjon por la deputitaj elektoj kaj en 1978 je la balotoj por la EK-Parlamento. Tiam, kiam en 1976 la belgaj verduloj obtenis nur 2% de la voĉdonoj, en 1979 la listo "Europo-Ekologio" gajnis pli ol 10%.

Dum la aprila monato de 1980 kreiĝis en la francparolanta parto de Belgio la movado "Ecolo", kiu nun kun "Agalev" (en la flandra parto de la lando) abunde konigas la ekologiajn ideojn. "Ecolo" estas kohera, strukturita movado kiu funkcias laŭ la doktrino de "tuta federismo" (tio signifas ke ĉiuj povoj apartenas al la bazo) ne kiel en tradiciaj partioj !

De 1981 la ekologia movado "Ecolo" estas la 4a politika forto en Valonio . . . .

|Daŭrigota|

### Pri fakvortaro ... kaj aliaj temoj !

Paul Touron (Francio) skribas: "Ne povas esti politika Ekologismo sen scienca Ekologismo. (Mi proponas tiujn du malsamajn vortojn por malsamigi la du ideojn.)

Nia AVENO ne forgesu sciencan parton de konaĵoj pri naturo. Ni ne povas defendi nian ĉirkaŭaĵon sen scii pri kio oni parolas. Tio evitos al ni esti kontraŭdiritaj kiam ni proponas ion. Ankau ni devas proponi temvortaron pri nia fako. Pri ambaŭ mi povas labori."

La redaktoro respondas: La preparo de temvortaro estas nepra afero, Paŭlo, kaj ni volonte eldonos viajn difinojn iom post iom en ĉiu numero de nia bulteno. Pri la scienca aspekto, eble tio pli taŭgas en nia nepolitika frato-gazeto, EKOPERANTO (kiu ankaŭ, antaŭ kelkaj jaroj, ekeldonis fakvortaron). La entuziasmoplena redaktoro de tiu organo de la Ekologia Rondo Esperantista estas Rezsö Baross, Balzac u.11, H-1136 Budapesto. Sub lia gvidado estiĝas Koresponda Kooperativo por preparo de "Internacia Natur- kaj Medioprotektada Esperanto-Organizo." Li proponas ke tiu asocio naskiĝu dum la TEJO-kongreso en Eringerfeld; do ĉiuj kiuj interesiĝas pri tio iru tien, se eblas. (Bedaŭrinde mi mem ne povos ĉeesti tiun kongreson, sed kiel la fondinto de A.V.E. mi forte subtenas la kreadon de ekologia asocio nepolitika, ĉar tiam la politika rolo de A.V.E. povos pliprecizigi.

C.F.

## EKZEMPLO PRI PRAKTIKA AGADO

Antaŭ iom da tempo mi ricevis informilon eldonita de la belga ekologia movado "Ecolo" kiu prezentas utilan ekzemplon por konkretigi la vidpunkton kiun mi priskribis sur paĝo 2.

En tiu informilo "Ecolo" sciigis ke ĝi bezonas multajn individuajn helpojn, kaj precipe de ekologiistoj ne loĝantaj en Belgio. Ĉu ne estas bona okazo por provi al tiu movado ke Esperanto tiaokaze tre utilas ? Pro tio mi decidis proponi al vi subteni tiun agadon kaj poste mi kontaktos "Ecolo" por sciigi la kialon de tiaj internaciaj partoprenoj.

Do nun precizoj pri la agado iniciatita de "Ecolo":

La 23an de majo 1984 la belga registraro fine akordiĝis kun Francio por realigi novan nuklean centralon en Chooz. Sendube tio estas malvenko por la ekologiaj movadoj, kiuj longe kontraŭiĝis al tiu konstruado.

Sed la konstruado de la centralo ne sufiĉis, kaj baldau naskiĝis nova registara projekto, pri kiu la ekologiistoj ne povas konsenti.

Ĉiu scias ke la nukleaj centraloj bezonas multe da akvo. La rivero apud kiu estas la centralo de Chooz havas malregulan elfluokvanton. Pro tio granda baraĵo estas jam projektita sur la rivero Houille.

Tio konkrete signifas la detruon de unu el la plej belaj valoj de la regiono Ardennes, kaj pro tio "Ecolo" decidis instigi agadon por malfaciligi la konstruadon de la baraĵo. Ĝi kreis leĝan asocion, kiu aĉetis terenon apud la rivero. Simbola kaj ankau tre konkreta agado. Ĝi permesos malfruigi la baraĵkonstruadon ĉar unue oni devos eksproprii la posedanton de la tereno: por tio oni devas leĝe havigi al si la konsenton de la posedanto, kaj kompreneble ju pli multaj la poseduloj des pli grandaj la malfacilaĵoj.

"Ecolo" proponas al ĉiu aĉeti $1m^2$ de la tereno (tio kostas nur 100 belgajn frankojn).... La eksterlandanoj estas ĉefe bonvenaj ĉar tio ankorau pli komplikos la juran situacion!

La AVE-anoj povas havi efikan rolon en tiu agado . . . kaj ankaŭ helpi min por aposteriore informi pri Esperanto, se per tiu artikolo mi kolektas sufiĉe da partoprenoj . . . .

Bonvolu, se tio interesas vin, kontakti min kiel eble plej rapide.

Jean-Claude Thumerelle
(adreso sur la kovrilo)

## NOVAĴOJ EL DIVERSAJ LANDOJ

Belgio Ni ĝojas ke ambaŭ el la du novaj membroj verdaj de la Eŭropa Parlamento - François Roelants por Ecolo kaj Paul Staes por Agalev - estiĝis anoj de la Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo (EPEG). Ne ĉiuj (eble ne multaj!) el tiu grupo parolas Esperanton, sed minimume ili favoras la uzadon de nia lingvo por solvi diversajn problemojn.

Japanio Ni gratulas s-ron Tomino, juna firmaoestro produktanta polucipreventilojn, kiu - laŭ tiu ŝatata magazino MONATO - venkis en balota batalo kun urbestro kiu intencis anstataŭigi raran arbaron per loĝkvartalo por soldatoj.

Kanado Okaze de la fondanta kunveno de la Verda Partio de Kanado en novembro 1983, s-rino Vilma Eichholz prezentis tezon pri la bezono de tiu lando (kaj aliaj!) pri inter-etna lingvo; kvankam malakceptita dum laŭdire ĥaosa kunveno, ĝi certe pensigis multajn verdulojn kanadajn pri ebla solvo al la serioza lingva problemo de tiu lando.

Sovetunio Lastatempe aperis pluraj bele presitaj libretoj pri paco kaj nuklea armado. La kontraŭ-usona enhavo surprizos neniun, kaj ni verduloj kompreneble preferus eldonaĵojn bedaŭrantaj la posedon de tiaj armiloj de ambaŭ superpotencoj. Tamen se nur ankaŭ la Usonanoj eldonus similajn dokumentojn en Esperanto, tiam almenaŭ la verkistoj el tiuj du landoj povus rekte komuniki per vere neŭtrala lingvo.

Norvegio En interesa letero pri verdisma agado tiu norda kaj ofte blanka lando, s-ro Douglas Draper (Sørbratveien 27, N-0891 Oslo) skribas ke la movado "La Estonteco en Niaj Manoj", fondita far Erik Dammann en 1974, nun havas ĉ. 25000 membrojn, kaj ke pro tio la Eo-klubo de Oslo jam okupiĝis pri esperantigo de verdismaj ideoj. Alian ideon li havas estas lernolibro por verduloj, kie la kutimajn dialogojn kaj ŝercojn anstataŭus tekstoj pri ekologio kaj paco.

Usono Don Weaver (Box 1961, Burlingame, CA 94010) serĉas homojn kiuj tradukos la "Teorion de Hamaker" en diversajn lingvojn. (John Hamaker, kiu antaŭ pluraj jaroj prognozis lastatempajn sekecegojn en Afriko kaj severajn vintrojn en Usono, antaŭvidas, pro sciencaj kialoj, la alvenon de nova glaciepoko antaŭ la fino de la nuna jarcento.)